



Enhavo

- La Tago de Eŭropo
- La Jarlibra retversio pri landa agado
- <Landa Parad'> por Eŭropo
- AMO 67 – Aktivula Maturigo
- La rejunigo de nia Eŭropa komunumo

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-42 sendita el Budapeŝto, la 18an de aŭgusto.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

La Tago de Eŭropo en la Monda Fest'

En la tuja sabato (22a de aŭgusto) okazos tiu Tago de Eŭropo. Ĝi certe estos multe partoprenata. Aleks Kadar kaj Renato Corsetti ege laboris kompili interesan programon. Aldone al forumo kaj enkonduka prezento, deko da Eŭropaj Landaj Asocioj, el ĉiuj anguloj de la kontineto tra 5 minutoj prezentos sian laboron.

La programo ekos je 13:00 CEST (tio estas UTC +2).

12:30: neformala interkonatiĝo

13:00 : oficiala malfermo kun salutoj de UEA kaj la Eŭropa Komisiono
Muzika antaŭludo

13:30 : raportoj pri aktivecoj en deko da Landaj Asocioj.

15:00 : muzika interludo

15:10 : <Landa Parad'> en Eŭropo por 2020 (prezento SMG)

15:30 : Prelego de Francesco Maurelli pri subvencipetado.

16:00 : Eŭropa Forumo: Eŭropa E-Unio, EDE, la Eŭropa Komisiono.

16:30 : Libera Diskuto kaj la oficiala fermo

17:00 : Koncerto kaj Kant-ateliero de Kajto

* Ĉiuj horoj estas indikitaj proksimume, ili povos ŝanĝiĝi laŭ disvolviĝo de la viva programo.

Aliĝintoj baldaŭ ricevos la alirinformojn. La sesio estas sub la teknika prizorgo de IREA.

Jen la loko por aliĝi (du-tri-minuta procedo).



https://docs.google.com/forms/d/14zcngMnjBYRlBtu40cEbrlS_GnEqOA2PEgTwKdsQBxw/

Fona materialo: <Landa Parad’> por Eŭropo

Finfine, jen la rezulto de kvar monatoj da intensa laboro, ene de kiu ĉiu landa asocio estis unu aŭ dufoje kontaktita. La reagoj estas iom limigitaj, sed la dokumento liveras unikan fonton de informoj pri la Landaj Asocioj kaj la landa agado en Eŭropo. Ĝi estas konsiderebla ampleksigo kaj riĉigo de la siatempa Jarlibra sekcio. Eŭropo estas la unua kontinento, kies dokumento estas ĝisdatigita por 2020.

La dokumento ne estas peza (915 KB), sed ekzistas pli korpulenta versio (2.3 MB) liverbla laŭpete. Ni arde rekomendas, ke vi konu la staton de la Esperanta vivo en ĉi tiu kontinento. La ordo de informoj laŭlande sekvas unuecan vicordon, por ke estu maksimume trovebla. Ĝis la fino de la jaro ni eldonos duan version; ene de tio ni enprenos informojn kaj ĝisdatigojn alvenintajn tra la sekvaj monatoj.

Monatfine ni aperigos la dokumenton en la retejo <aktivulo.net> ĝis kiam devos esti preta la <Landa Parad’> por la regiono MONA (Mez-Oriento kaj Nord-Afriko).

Proksime ligita temo por la sekva AMO-seminario

La 67a AMO-seminario okazos virtuale en la 13a de septembro (dimanĉe), kunlabore kun la 8a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wrocław, Pollando. La temo estos: ‘Varbado de junuloj en Eŭropo.’ Sekve ĝi prenas la temaron de la Eŭropa Tago kaj firme direktas la fokuson al brule urĝa demando, kiun ni reliefigos en la Tago de Eŭropo. Ni dissendos preparan materialon pere de sekva EKO-komuniko, por ne troe ŝargi la nunan komunikon per pli ol unu alkroĉaĵo.



Junuloj el antaŭa kantfestivalo.
Foto: SMG.

===== vortoj: 430 =====

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.